

## Esperanta scienca revuo pri Interkultura Komunikado

La ideo ne estas nova. Krom la historiaj spertoj, ĉi tiu propono venas de esperantistoj, kiuj parolas pri la afero iom delonge. Poste du el ili realigis la universitatan entreprenon Civiencia SL, kiu celas demokratiigi la sciencon kaj disvastigi Esperanton kiel scienco-komunikilon, rilate al kio la ekzisto de imitinda scienca revuo havas potencon. Poste la grupo ILEI-ESF pri universitato kaj Esperanto decidis apogi la realigon de revuo per la sistemo OJS, kiel unu el la gravaj eroj por fortigi la rilaton inter ambaŭ (Esperanto kaj Universitato). Iom da monatoj poste teamo de esperantistoj ekpaŝis en la planado de la Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado, [IKIKO](#), kie la ekzisto de scienca kaj popola revuo estus bonega sinergio. Kaj fine, danke al la aranĝado de IRIS, aliaj esperantistoj ekinteresiĝis je tiu projekto.

La propono sinthesize estas la jena:

1. Realigi sciencajn revuojn per la sistemo MRS (Malfermata Revuo-Sistemo, Open Journal System, OJS).
2. Civiencia SL estas la eldonejo kaj respondecas pri la servilo.
3. La revuo estas duoble senpaga: publike legebla kaj sen kostoj por aŭtoroj.
4. La revuo realiĝu per fona kumpensado pri tio, kio devus esti scienca revuo nuntempe. Amasiĝis multe da kritikoj al tradiciaj sciencaj revuoj. Estus bone repensi la aferon kaj libere krei novan specon.
5. La oficiala lingvo de la revuo (labora kaj publikiga lingvo) estas Esperanto.
6. Krom Esperanton la revuo akceptas ĉiujn lingvojn, pri kiuj ni havas reviziontojn.
7. Krom ĝia scienceco, la revuo klopodas disvastigi la scion al la ĝenerala popolo per diversaj realaj rimedoj.
8. La revuo klopodos realigi rilatojn kun aliaj revuoj kaj sciencaj datenbankoj por la celo iel tuŝi tian mondon, montrante alian manieron science nehegemonie kondukti, kie Esperanto havu rolon.
9. La revuo daŭros danke al la starigo de vasta teamo, diversa laŭ la disciplinoj, kulturoj, gepatraj lingvoj, etnoj, seksoj kaj referencaj landoj, inter aliaj variabloj.
10. La temo de la revuo estas la Interkultura Komunikado. Temas pri alloga, vasta kaj utila kampo de la scio, kaj teoria kaj praktika. Pluraj disciplinoj interesiĝas pri tio: antropologio, sociologio, politiko, psikologio, informatiko, edukado, lingvistiko ktp. Temas pri ege nuntempa defio kaj ankaŭ bonega oportuno denonci la nuntempajn hegemoniajn praktikojn kaj anonci solvojn.
11. Unu el la taskoj de la teamo estas interkonsentite redakti etikajn principojn, kiuj ne nur utilis por la praktika laboro ene de la revuo, sed ankaŭ klopodos iel kontaĝi aliajn revuojn aŭ projektojn de revuo.

IKIKO 2021 okazos en decembro. Partoj el ĝiaj sciencaj kontribuoj nutros la unuajn numerojn de la revuo por 2022. Unu el la ĉefaj celoj de la laboro rilatata al la revuo estas garantii bonan kaj sufiĉe kvantan eniron de proponoj. Nun ni ekpaŝas krei la teamon de kumpensantoj, kiuj repensu tion, kio estu scienca revuo popole utila kaj praktike realigu la projekton antaŭ decembro de 2021.

Kontakto: [viko@civiencia.io](mailto:viko@civiencia.io)